



SES – bulteno 2018-06-27

Informoj por aliĝintoj al la Somera Esperanto-Studado 2018,
Liptovský Mikuláš, Slovakio

Elkoran dankon pro via aliĝo! Ni rekomendas al vi trovi iom da tempo por tralegi la ĉi-subajn informojn por esti bone preparita por senproblema alveno kaj ĉeesto en SES 2018.

Rimarko: bonvolu plusendi tiun ĉi mesaĝon al aliaj koncernuloj, se ili aliĝis per via retroŝtadreso, eventuale sciigu ilin pri la enhavo de ĝi.



Gravaj informoj

Dum la tuta aranĝo necesas sekvi instrukciojn de la organizantoj. Ĉiu partoprenanto partoprenas la aranĝon je siaj propraj respondeco kaj danĝero, kion li/ŝi konfirmas per sia subskribo ĉe registriĝo. Li/ŝi portas personan respondecon pri la damaĝoj de sano kaj havaĵo kaŭzita al si mem aŭ al alia persono. La organizanto (E@I) ne transprenas respondecon pri damaĝoj je sano kaj havaĵo de partoprenantoj, kiuj rilatas ĉeeston de la aranĝo SES 2018, aŭ vojaĝon kaj restadon en la loko de ĝia okazigo.

1. Pagoj

Bonvolu memori, ke via aliĝo estos valida nur post ricevo de la antaŭpago por la aranĝo (pago de aliĝkotizo). Sen tio, ni ne povas garantii rezervitajn tranoktojn, manĝojn kaj aldonajn servojn (vi povas pagi antaŭe ankaŭ la tutan sumon necesan). Se vi ankoraŭ ne pagis la aliĝkotizon, faru tion laŭeble baldaŭ.

2. Mono

En Slovakio validas la valuto eŭro, mallonge EUR. Por la aranĝo eblas pagi surloke nur per eŭroj (ni ne akceptas aliajn valutojn). En la urbocentro troviĝas monŝanĝejoj. Bankaŭtomatoj por preni monon tamen troviĝas en la urbo, la plej proksima (laŭ Google Maps) ĉe la superbazaro Kaufland, ĉirkaŭ 8 minutojn for de la SES-ejo. Dum la aranĝo eblas aĉetadi, ekzemple en trinkejo aŭ libroservo, same nur kontraŭ eŭroj.

3. Alveno/foriro

La aranĝo komenciĝas la 14-an de julio posttagmeze (alveno eblas ekde la 14-a horo) kaj finiĝas la 22-an de julio posttagmeze, je la 13-a horo. Kaze de bezono eblas veni 1 nokton pli frue, kaj eventuale resti unu nokton post la aranĝo, kontraŭ kroma pago. Se vi bezonas kromajn tranoktojn, nepre informu nin laŭeble plej rapide, por povi rezervi lokojn.

Adreso de la SES-ejo

SES 2018 okazos en studenthejmo, kies plena adreso estas:

Rekreačné zariadenie Demänovka pri SOŠ polytechnickej

Demänovská cesta 669

031 01 Liptovský Mikuláš, Slovakio

(Pli da informoj en <https://ses.ikso.net/2018/loko.php>)

Kiel atingi SES-ejon

Liptovský Mikuláš estas urbo situanta en bela montara medio, ĉ. 210 km de Bratislavo, la ĉefurbo de Slovakio.

La urbo Liptovský Mikuláš estas bone konektita kun Bratislavo kaj aliaj gravaj urboj de Slovakio: ĝi troviĝas sur la ĉefa fervoja linio, kiu ligas Bratislavon kun Trnava, Trenčín, Žilina, Poprad, Košice, ktp. De Bratislavo, la veturado daŭras tri aŭ kvar horojn. Por serĉi taŭgan konekton vidu www.cp.sk (dekstre sube eblas ŝanĝi la lingvon al la angla aŭ la germana).

Per karavano

Karavano estas grupa trajna vojaĝo, kiu ebligas ĝui grupajn rabatojn. Karavano estas planata de Strasburgo tra Germanio (Karlsruhe, Ulm, Munkeno, Passau) kaj Aŭstrio (Linz, Amstetten, Vieno). Pli da detaloj troviĝas en [nia retejo](#).

De la flughaveno en Bratislavo

Veturu per la buso n-ro 61, kiu alportos vin rekte de la flughaveno (“Letisko”) al la ĉefa trajn-stacidomo (“Hlavná stanica”). La stacidomo estas la lasta haltejo, la veturo daŭras 25 minutojn. De tie per trolebuso nr. 210 aŭ per la buso nr. 21 vi povas atingi busan stacidomon (“Autobusová stanica Mlynské Nivy”). La vojaĝo daŭras 8 minutojn (3 haltejoj). Vi povas kontroli ĉiujn itinerojn kaj plani vian vojaĝon en Bratislavo ĉe <http://imhd.sk/ba/>. Bona poŝtelefona aplikaĵo por serĉi konektojn en Bratislavo estas Ubian.



Biletoj aĉeteblas en la flavaj aŭtomatoj en la bushaltejo aŭ en la gazet-giĉetoj. Se vi planas iri nur al la trajna stacidomo, aĉetu 30-minutan bileton kontraŭ 0,90 €. Alikaze necesos 60-minuta bileto kontraŭ 1,20 €. Biletoj ebligas ŝanĝi veturilon plurfoje.

De la flughaveno en Vieno (Wien)

Ekzistas bona rekta busa konekto inter Viena flughaveno (“Flughafen Schwechat”) kaj la ĉefa busa stacidomo en Bratislavo (haltejo “Autobusová stanica” aŭ “AS Mlynské Nivy”). Vi povas kontroli itineron kaj aĉeti busajn biletojn anticipe ĉe <https://www.slovaklines.sk/main-page.html> aŭ <https://cestovnelistky.regiojet.sk/>. La biletoj ankaŭ aĉeteblas rekte en la buso, kondiĉe ke estas liberaj lokoj.

De Bratislavo al Liptovský Mikuláš

Trajnoj al Liptovský Mikuláš estas sufiĉe oftaj, minimum ĉiun duan horon.. Kontrolu taŭgajn konektojn laŭ via alventempo ĉe la retejo www.cp.sk.

La trajnbiletojn oni aĉetas en la stacidomo aŭ ĉe la kondukto en la trajno, sed tiam kun eta krompago.

De alia urbo al Liptovský Mikuláš

Ekzistas rektaj trajnoj de Prago al Liptovský Mikuláš ofertataj de la kompanioj [Leo Express](http://www.leoexpress.sk) kaj [RegioJet](http://www.regiojet.sk). Pli da detaloj vi trovos en la paĝo <https://ses.ikso.net/2018/alvenebloj.php>.

En Liptovský Mikuláš

Piede

De la stacidomo (trajna aŭ busa – ili troviĝas unu apud la alia) eblas iri piede al la studenthejmo. Laŭ la vojo indikita en tiu ĉi [mapo](#), vi povas atingi la SES-ejon ene de 30 minutoj.

Per buso

La plej proksima bushaltejo nomiĝas *Palúdzka, SOUP*, kiu estas tuj antaŭ la SES-ejo. Tamen busoj nur malofte haltas tie. Alia taŭga haltejo estas *Palúdzka, KAUF LAND*, al kiu iras rekte la busoj 5, 9 kaj 11 de la stacidomo (haltejo Autobusová stanica) – sed ne ĉiuj haltas ĉi tie.

Detaloj pri la urbaj busoj en Liptovský Mikuláš troviĝas en la retejo imhd.sk.

Per taksio

Eblas atingi la SES-ejon ankaŭ per taksio, per ekzemple:

[City Taxi Liptovský Mikuláš](#): +421 907 87 67 57

[Liptov Taxi](#): +421 907 780 780

La veturo kostas 2 aŭ 3 € – vi povos dividi la koston, se vi estos pluraj, kaj tio estos pli oportuna maniero ol buso.

4. SES-ejo



En la SES-ejo estos je dispono bufedeto, trinkejo kaj libroservo.

En la SES-ejo estos aparta komputila ĉambro, uzebla dum certaj horoj (posttagmeze), sed ankaŭ senpaga sendrata reto estos atingebla. Ĝin eblos uzi per propraj porteblaj aparatoj. (Bv. do kunporti vian, se vi bezonos retumi dum la aranĝo).

En la konstruaĵoj de SES estas malpermesita fumado – bv. respekti tion kaj laŭbezone fumi nur ekster la areo.

En la SES-ejo je dispono estos sporta ekipo (pilkoj, badmintonaj rakedoj, ktp.). En la SES-eja teretaĝo estos tablotenisa tablo, kiun eblos uzi. Por la pruntepreno de la ekipo bonvolu kontakti organizantojn surloke.

5. Manĝoj

Manĝado okazos en la manĝejo de la studenthejmo (laŭ tempoj indikitaj en la program-tabelo).

Ĉiuj, kiuj ne mendis manĝojn, devos mem prizorgi manĝojn. En la lernejo funkcias bufedeto, kie eblos aĉeti simplajn manĝojn, sandviĉojn, dolĉaĵojn kaj trinkaĵojn.

Relative proksime al la SES-ejo ekzistas kelkaj restoracioj. 600 m for de la SES-ejo troviĝas vendejo Kaufland. En la SES-ejo (en la angulo de la manĝejo) ekzistas mikroondilo kaj akvoboligilo (tamen sen kuirekipaĵo) por memzorgantoj.

Se vi volas mendi manĝojn, sed ne faris tion en via aliĝilo, bonvolu skribi al ses@ikso.net.

Kafopaŭzo

Dum la antaŭtagmeza instruado okazos en la unua de lernejo kafopaŭzo kun senpagaj teo, kafo kaj akvo. Bonvolu kunporti **propran tason** por tiu celo. Por ŝpari la vivmedion ni volas eviti uzadon de plastaj glaso kaj taso. Se vi ne kunportos propran tason, vi povos aĉeti kontraŭ 3 eŭroj surloke ceramikan tason, ornamo ĝin laŭ via plaĉo kaj uzadi ĝin dum la semajno.

6. Aĉetoj

La SES-ejo troviĝas sufiĉe proksime de la urbocentro. En la urbocentro troviĝas apotekoj, trinkejoj, kafejoj, restoracioj. La plej proksima vendejo, malfermita ĉiutage (lundo-sabato 7-21, dimanĉo 8-20) estas Kaufland.

Rimarko: vi povas rigardi nian [Google-mapon de la urbo](#) kun markitaj gravaj lokoj.

7. Ĉambroj, tendoj, prelegejoj

Je dispono estas dultitaj kaj trilitaj ĉambroj en la studenthejmo. Ĉiu duopo de ĉambroj havas komunan fridujon, necesejon kaj duŝejon. Vi ricevos litotukojn, sed bonvolu nepre kunporti **propran bantukon**. La studenthejmo ofertas “normalajn” (ordinarajn) kondiĉojn por tranoktoj, do ne atendu grandan lukson.

Kaze ke vi mendis ĉambron kiel studento, bv. kunporti vian ISIC-karton aŭ alian studentan identigilon/konfirmilon.

Tendumantoj devas kunporti propran tendon, dormosakon kaj matracon. Oni povos starigi tendojn en la korto de la SES-ejo. Tiuj, kiuj mendis tranoktojn en **amasloĝejo** (granda ĉambro, kie homoj dormos komune), devas kunporti dormosakon kaj matracon. Tendumantoj kaj amasloĝejanoj havos eblon uzi necesejon kaj duŝejon.

En la SES-ejo **ne** ekzistas lavmaŝinoj.



8. Utilaj ligiloj rilate al vojaĝado kaj tranoktado en Slovakio

Vojaĝ-horaroj

<http://cp.sk/> – trajnoj, busoj, aviadiloj, urba trafiko, kombinaĵoj trajnoj + busoj [sk, en, de]

<http://imhd.sk> – urba trafiko por diversaj slovakiaj urboj [sk, en]

Mapoj

<http://maps.google.com/> [diversaj lingvoj]

<http://www.supernavigator.sk/navigator/> [sk, cs, en, de, hu]

<http://mapy.hiking.sk/> - turistaj mapoj de Slovakio [sk]

Loĝado

<http://www.ubytovanienaslovensku.eu/> [diversaj lingvoj]

<http://www.limba.com/sk/slovensko/ponuka> [diversaj lingvoj]

<http://www.prenocuj.sk/> [sk, cs, en, de, pl, hu, es]

Turistaj informcentroj

<http://www.slovakiatravels.com/> [sk, en, it]

La slovakia lingvo

<http://slovake.eu> — paĝaro por lerni la slovakon; ĝi enhavas ankaŭ minikurson kun utilaj frazoj por turistoj! [eo, sk, en, de, pl, lt, fr, es, cs, hr, hu, ru, ko]

Se vi tamen bezonas iun aldonan informon aŭ konsilon, bonvolu skribi pri tio al ses@ikso.net.



Programo

9. Instruado

Instruado okazos en pluraj grupoj laŭ la lingvonivelo, ĉiam antaŭtagmeze (9.00-13.00). Ni dissendos al ĉiuj aliĝintoj **mallongan memtaksilon** por dividi vin je lingvogrupoj. Dum la alventago, sabate posttagmeze inter 17:00 kaj 19:00 okazos mallonga testado por tiuj, kiuj ne plenigos la memtaksilon.

Tutaj komencantoj, kiuj absolute ne scipovas la lingvon, povos veni en la tempo de testado al la klasĉambro por komencantoj – kie ili havos enkondukan lecionon kun sia instruisto (detalojn demandu dum la registriĝo aŭ serĉu post via alveno en la program-tabulo).



10. Distra programo



En aparta dokumento (kelkajn tagojn antaŭ SES) ni sendos provizoran program-tabelon de SES kaj la detalan programlibron. Ĝi ne estas kompleta; kelkaj aferoj povas aldoniĝi al la programo dum la sekvaj tagoj aŭ eĉ dum la aranĝo mem. Same povas eventuale ŝanĝiĝi tempoj de unuopaj prelegoj kaj prezentoj.

Dum la ekskursaj tagoj estos preparita aparta programo por tiuj, kiuj ne ekskursos – prelegoj, manlaboroj, sportoj k.a. (informoj pri tio aperos iom pli poste). Aldone eblos pasigi liberan tempon ekster la oficiala programo organizata de la SES-teamo (ekz. ludante, promenante tra arbaroj, urbo k.s.). En la SESejo estos aranĝita loko por tabloludoj, tablotenis kaj danctapiŝoj.

Rimarko: ĉiam kontrolu la programtabulon en la SES-ejo (kiu estos ĉe la akceptejo, ĉe la ĉefa enirejo) por ricevi la plej ĝustan kaj detalan informon pri la programo. Ĉiuj aliaj fontoj de la programo povas enhavi malnovan kaj ne plu aktualan programon.

11. Via kontribuo

Vi mem povas ankaŭ kontribui al la programo de SES: proponi ion interesan, kion vi deziras prezenti al aliaj partoprenantoj (kantadon, prelegon, instruadon de via lingvo...). Se vi bezonas iun specifan ekipaĵon por via programero, kontaktu la organizantojn anticipe.

Via kontribuo estos ankaŭ bonvena dum la Internacia Vespero, dum kiu vi povos prezenti vian landon, kulturon, lingvon per ia artaĵo (kanto, spektaklo, muziko...). Prepariĝu volonte por ĝi jam antaŭ la aranĝo, kunportante ekz. muzikon aŭ muzikilon, tradician vestaĵon de via lando aŭ regiono k.s.



Kuirarta festivalo (16-a de julio, 21:00)

Ĉu vi interesiĝas pri la kulturoj de la mondo? Jen oportuno ekkoni la gustojn de aliaj landoj. Dum la internacia kuirarta festivalo vi povos senpage gustumi diversajn eksterlandajn specialaĵojn. Por sukcesa festivalo, ĉiu partoprenanto kunportu ion de sia lando (manĝeton, sukeraĵon / kukon / keksojn, trinkaĵon, alkoholaĵon, ktp.).

Se vi havos spacon en via valizo, bonvolu kunporti ion de via lando! Plej bonas famaj aŭ strangaj aferoj (aŭ ambaŭ), kiujn oni ne povas facile aĉeti eksterlande. Ĉiu lando havos tablon por prezenti la kunportitaĵojn kaj la ĉambro iĝos bazaro de malsamaj gustoj.

Peĉakuĉo

Kio estas peĉakuĉo?

Peĉakuĉo estas prezentformato de mallongaj elpaŝoj, intence limigitaj je formo kaj daŭro. La celo de tiaj prezentadoj estas rapide konatigi la spektantojn kun diversaj interesaj ideoj, projektoj kaj temoj. Dum ĉi-jara SES ni planas okazigi 2 peĉakuĉojn: unu estos ĝenerala, kaj en la alia temo nur pri Esperantujo!

Reguloj de peĉakuĉo:

— Via prezentaĵo (farita en la programo PowerPoint, LibreOffice Impress aŭ similaj) devas enhavi ĝuste 20 bildojn.

— Ĉiu folio de la prezentaĵo estas montrata nur dum 20 sekundoj. Do, via akompana komento por ĉiu folio devas daŭri 20 sekundojn.

— Suma tempo de prezentaĵo estas 6 minutoj 40 sekundoj.

— Sur la foliojn de la prezentaĵo metu nur bildojn! Foje eblas aldoni titolojn — sed mallongajn.

— Via rakonto ne dublu la informon sur la folioj de prezentaĵo.

— Post prezentaĵo vi havos 6 minutojn kaj 40 sekundojn por respondi demandojn de la spektantoj. Sendu viajn prezentaĵojn al ses@ikso.net! Por pli da informoj vidu nian [Facebook-paĝon](#).



12. Aldona libera programo

Krom la oficialaj programeroj, vi havas liberan elekton por propra, privata pasigo de tempo. En kaj ĉirkaŭ la urbo Liptovský Mikuláš ekzistas pluraj vidindaĵoj kaj vizitindaj lokoj, pri kiuj eblas ekscii en la turisma centro.

13. Ekskursoj

Dum SES okazos 4 duon-tagaj kaj 3 tuttagaj ekskursoj (pliaj detaloj: <http://ses.ikso.net/2018/ekskursoj.php>).

Duontagaj ekskursoj:

Urba piedira ekskurso

prezo: 8 EUR, dato: 2018-07-15

Altaj Tatroj

prezo: 15 EUR, dato: 2018-07-16
kunportu bonajn ŝuojn

Pribylina – subĉiela muzeo

prezo: 12 EUR, dato: 2018-07-17

Glacia groto Demänovská

prezo: 22 EUR, dato: 2018-07-20
vestiĝu sufiĉe varme: ja estos glacia temperaturo en la groto



Tuttagaj ekskursoj, merkrede, la 18-an de julio (ili okazos samtempe, eblas do elekti nur unu el ili):

Monto Poludnica

prezo: 10 EUR, dato: 2018-07-18
kunportu bonajn ŝuojn kaj sufiĉe da akvo

Spiŝa burgo, Levoča kaj Poprad

prezo: 29 EUR, dato: 2018-07-18

Buso al la lago Liptovská Mara / Tatralandia

prezo: 10 EUR, dato: 2018-07-18

se vi volas iri al la akvoparko Tatralandia, vi devos mem aĉeti biletojn – prezoj estas en [ĝia retejo](#)

Kaze ke vi ankoraŭ ne mendis la ekskursojn, aŭ volas ŝanĝi vian elekton, faru tion laŭeble rapide, ĉar la lokoj estas limigitaj. Vi povas mendi ilin aŭ informi pri ŝanĝoj sendante retmesaĝon al: ses@ikso.net.

14. Anĝeloj

Dum la aranĝo tiel nomataj **anĝeloj** zorgos pri “novuloj” – tiuj, kiuj ne ĉeestis ĝis nun internacian Esperanto-aranĝon. Anĝeloj havos alikoloran (flavan) nomŝildon kaj prezentiĝos dum la unua vespero. Homoj-anĝeloj povas helpi al tiuj, kiuj estas novuloj pli bone orientiĝi dum SES: konsili al ili programerojn, klarigi aferojn, preparoli problemojn... Anĝeloj estas kutime spertaj esperantistoj, kiuj bone konas similajn aranĝojn. Ne hezitu alparoli anĝelon, se vi ekhavas iun ajn demandon aŭ malfacilaĵon, ĉar ili volonte pretas helpi al vi!



15. Kontaktoj

Se vi havas ajnajn demandojn aŭ komentojn, bonvolu skribi al ses@ikso.net.

Ĝenerale ni petas kontakti nin rete, sed kaze de *tre urĝa* bezono dum via vojaĝo, vi ankaŭ povas kontakti organizantojn telefone:

Petro: +421 902 203 369

Matthieu: +421 948 155 805

Se vi uzas la aplikaĵon Telegramo, vi povos aliĝi al Telegram-grupo pri SES, kie vi povos komuniki kun organizantoj kaj aliaj partoprenontoj: https://t.me/joinchat/EUXK1z_ufRcbF1H_9AF3oQ

Vi ankaŭ povas sekvi nin en Facebook: <https://www.facebook.com/SomeraEsperantoStudado/>

Ĝis revido dum SES 2018 en Liptovský Mikuláš,

Via SES-teamo